# BULGARIO – MALFACILAĴOJ ĉe TRANSPASO de RUBIKONO

Svetlana Panajotova

Ekde mia preskaŭ unujara restado kiel gasto–studentino en Svislando kaj ekde miaj kontaktoj kun la rimedoj por amasinformado mi havas impresojn, ke Bulgario estas malmulte konata al la okcidenta legantaro. La alpaŝo al la eks–socialismaj landoj estas diferenciga, sed bedaŭrinde Bulgario ne estis en la frunta triopo de la landoj sukcese plenumantaj la transpason al merkata ekonomiko laŭ paca vojo. La plirapide realigita transpaso en Pollando, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio koncentris la intereson al ili.

Laŭ mi, tiu fakto ne povas esti baza motivo por malprizorgado kaj malatentado al la procesoj en aliaj eks–socialismaj landoj.

Kial Bulgario ne povis eniri en la fruntan triopon, malgraŭ ke ĝi restis faktoro de paco kaj stabileco sur la Balkana duoninsulo.

La kaŭzoj ŝajnas esti historie kondiĉitaj. En Bulgario la eksperimentado per bazaraj elementoj kaj la eksperimentoj





de ilia integrado en t.n. socialisma ekonomiko komenciĝis relative malfrue je la fino de la 80–aj jaroj. Tiam la t.n. socialismaj produktadrilatoj montris pli klare sian malaltan produktivecon. Tiutempe en Hungario ekz. estis amasigita riĉa sperto pri uzado de merkataj elementoj en sia ekonomika modelo. La enkondukita ekonomika modelo en Bulgario ekde 1989 kuraĝe manipulis per nocioj, fremdaj al la plancentralizita ekonomiko (ekz. firmaoj, akcioj kaj obligacioj). Ĝuste ĝi metis la bazon de la privata agadkampa sektoro en Bulgario, malgraŭ ke la antaŭviditaj de ĝi akcioj kaj obligacioj estis sen ia ajn praktika valoro, ĉar mankis elementaj premisoj, kiuj povis plenumi siajn kutimajn funkciojn. Mankis informoj por firmaoj, kiuj intencis aperigi akciojn kaj obligaciojn, mankis bilborso.

Bulgario adiaŭis sin pli malfacile ol Hungario kaj Ĉeĥoslovakio de la komunismo. Ĉi tie ĝis oktobro 1991 regis koalicia registaro el socialistoj (ekskomunistoj) kaj deputitoj de la opozicio. Dum mallonga periodo 1990 – 1992 ni travivis dufoje balotojn de parlamento (junio 1990 kaj oktobro 1991) kaj baloton de prezidanto (januaro 1992). La grandega bezono al ŝanĝo de la ekonomiko kaj transiro al privatmastrumado estiĝis viktimo de la forta politikeco de la bulgara socio. Eĉ nun multaj civitanoj en la lando daŭre opinias, ke problemo unua estus la politiko kaj ne la kriza ekonomiko. La kulpo de la postrestado en la proceso de reformoj oni distribuas inter la multaj politikaj partioj. Translokiĝo de la pezocentro sur la politiko kaj ne sur la

ekonomiko alkondukis grandan malfruiĝon de la reformoj.

Ekonomika leĝfarado ĉe la transpasa periodo

La manko de leĝoj, kiuj povus postuli kiamaniere organizi tian respondecan reformon, kiu estas la aliro de plancentralizita al merkata ekonomiko, estiĝis problemo numero unu por la nuna parlamento elektita dum oktobro 1991. La leĝo donas stabilecon kaj legitimecon al la plej geniaj ekonomikaj decidoj. En la klaraj leĝoj elkristaliĝas la bazaj trajtoj de la transpaso. Nuntempe oni plulaboras pere de ŝanĝoj kaj suplementoj de la malnovaj ekonomikaj leĝoj, akceptita antaŭ la detronigo de eksgvidanto de la komunista partio kaj de la stato, Todor Ĵivkov. De tiu dokumento oni ne povas atendi la liberigon de la merkataj elementoj, ĉar ili estas antaŭminitaj. Bedaŭrinde oni laboras per dokumentoj de la plenumanta kaj ne de la leĝfaranta regpotenco.

Nur en la fino de aprilo 1992 estis akceptita la leĝo pri la privatigo. La registaro preparis programon pri t.n. granda privatigo . La plej grandaj ŝtataj enterprenoj estiĝos posedaĵo al la personoj, kiuj povas aĉeti ilin. La starto de la granda privatigo tamen malfruiĝos ĝis komenco de 1993 (laŭ la opinio de eksperto en la ministerio de la industrio kaj komerco). Ekzistas malfacilaĵoj ĉe la formado kaj leĝreglamentado de la komisiono por privatigo (simile al "Treŭhandanstalt": kuratora institucio por likvido de la



socialisma ŝtata propraĵo en eksa GDR). Laŭ la antaŭ nelonge akceptita leĝo por privatigo oni autaŭvidas, ke la komisiono estu subigita al la plenumestraro (registaro). Simila leĝa reglamentado okazis objekto de disputoj en la parlamento inter la reganta koalicio kaj la opozicio. Laŭ la opozicio tia organo de la komisiono enportas grandan konjukturecon en ĝian agadon. Malfacilaĵoj tamen komenciĝos ĉe la trovo de aĉetantoj por nun senvivaj gigantaj entreprenoj. La plimulto de ili ne havas eksposedantojn, ĉar ili estas frukto de t.n. reala socialismo, kio signifas, ke por ili oni serĉos kandidatojn. Due – la aĉetpovo de bulgaro limiĝis eĉ rilate al aĉetprezoj de la konsumvaroj: ni ne parolu pri aĉetado de ŝtataj firmaoj. Laŭ la opinio de la prezidanto de asocio por ekonomika iniciativo de la civitanoj ĉirkaŭ 90 % el la ŝtataj enterprenoj, kiuj devas estiĝi privataj, estas nevendeblaj pro la grandegaj ŝuldoj al la bankoj. Estas nature, ke la privata negocisto orientiĝos al liberaj merkantaj spacoj, ne al riparo de ruinigitaj ŝtataj entreprenoj. Kaj la fremdlanda investanto ne aĉetus entreprenojn, kies pasivoj superas ĝiajn aktivojn. Ekde 1991 Bulgario altiris nur 80 milionojn dolaroj da fremdkapitalo (per komparo: Hungario altiris 2 miliardojn dolaroj da fremdakapitalo). Nur depost la akcepto de leĝo por defendo de la fremdaj investoj Bulgario estiĝos pli alloga por la fremda investonto.

Tamen estos pli grave la ellaborado de koncepto pri la ĝusta strukturado de la fremdlanda kapitalo, iaj ekspertoj

devus klarigi al si mem en kiuj branĉoj de la ekonomiko oni povus prioritate investi fremdajn kapitalojn. Krome la investproceso devas esti liberigita de burokratismo, ĉar en sia nuna stato ĝi estas tre inerta kaj neefektiva. Estas necese subskribi amason da paperoj por realigi iun investon.

Legante la leĝojn en la sfero de la ekonomio oni havas la impreson, ke iuj de ili entenas multe da konflikta materio. La neprecizeco estas rezulto de la ekrapido de nia ekonomika reformo (ĝi tamen ne povas esti prokrastita kaj ankau ne havas alternativon). Al mi ŝajnas ankoraŭ, ke la konfliktoj estas logika konsekvenco de la maleblo de la ŝtato akcepti respondecon pri la agado de la ekonomikaj subjektoj en sia ŝtata sektoro.

Mi ilustras miajn timojn per la leĝo, kiu restituas propriet–rajton sur malgrandaj objektoj (magazenoj. laborejoj. atelieroj) al la eksposedantoj aŭ al iliaj heredantoj. Mi ĝuste mencias tiun leĝon, ĉar ĝia socia rezonanco estis granda. Imagu, ke vi aŭ viaj gepatroj ĝis la socialisma revolucio havis "juvelon"; laŭ la leĝo oni redonas al vi tiun objekton, sed vi ne havas rajton serĉi la profiton perditan dum jardekoj. Se la socialisma ŝtato aliigis la "juvelon" en grandan nutraĵ–magazenon, vi devas konservi ĝian nunan destinon dum unu jaro post ekvalido de la leĝo, ĉar la vendado de nutraĵvaroj estas socie direktita agado. Se oni faris plibonigojn de la havaĵo vi devas redoni la elspezojn al la eksa profitanto. Ne gravas ke vi jardekojn ne uzis la magazenon, ke vi ne bezonas la plibonigojn, ke vi eĉ



ne scias pri ili: ili estas faktoj.

La scienco ĉe la transpasa fazo.

La konflikta materio en la leĝoj estas neevitebla pro la kriza situacio de la fundamenta ekonomika scienco; ĝi estas diskreditita, ĉar multajn iarojn ĝi priservis la planekonomikon, sed plano kaj merkato estas neagordeblaj. Jardekojn oni asertis en la lernolibroj de politekonomiko, ke la branĉoj de la grupo A, kiuj produktas rimedojn por produktado, disvolviĝu prioritate (ekz. "Kapitalo" de K. Marx, 2a vol., "Skemoj por vastiga reproduktado"). Tamen, tiu grupo de fakoj (maŝinkonstruado, energetiko k.a.) havas sian okupon dank' al la fakoj, kiuj kontentigas la bezonojn de varoj por ĉiutaga vivo (t.n. grupo B). Kiam la registaro prenas nun decidojn kiel ĉe incendio, la situacio en la ekonomiko estas neeltenebla. Sciencistoj–ekonomistoj el Europo kaj Ameriko konsilis nin, ke la transpaso al merkata ekonomiko ne estas simpla apliko de kelkaj bazaj principoj de la monetarismo. Vera monetarismo taŭgas al altdisvolvita merkato, sed ĉe ni ankoraŭ 95 % de la proprietaĵoj apartenas al la ŝtato. Estas danĝere kopii receptojn de la okcidento, malgraŭ ke ili havis tie sukceson. Mi opinias, ke al la okcidento mankas komprenemo pri la nekredeble malforteco de la ekonomika kaj sociala sistemo en orienta Europo kaj konkrete en Bulgario. La malfacilaĵoj

ĉe la apliko de la okcidentaj receptoj venas de tio, ke ĉe ni post 1948 la privata propraĵo iom post iom estis sisteme negata. Tiu atenco ne estis limigita al malgrandaj dimensioj, ke oni povu nun rapide resanigi la grave malsanan ekonomikon.

En la nuna kompleksa momento la ekonomika scienco ege lamas post la struktura reformo, por kiu oni kreas konceptojn ne sur sciencteoria, sed nur sur eksperta nivelo. Ekzemple: ĝenerala estas la opinio, ke por instali iun pluralismon en la formoj de la propraĵo oni devos disbati la monopolon de la ŝtata propraĵo – tio signifas nova strukturado de la propraĵo en Bulgario.

Bedaŭrinde la ekonomika scienco ĉe ni ne donis starpunkton ĝis nun, ĉu la ŝtata propraĵo estas totale neefektiva kaj se ne, kiuj branĉoj devas esti konservitaj kaj en kia amplekso, kiel ĝi devas esti organizita por likvidi ĉian malproduktivecon. Postrestas la teoria respondo al la problemo pri la necesaj premisoj de transpaso al merkata ekonomiko pri amplekso de la privata agadsektoro. Se mankas merkata pensado ĉiu espero por rapida eliro el la krizo estas iluzia.

Ĉu la privata sektoro estas preta adaptiĝi al la transpaso.

La ekonomika scienco havas ŝuldon vidalvide tiuj, kiuj



estas portantoj de la ekonomika iniciato, sed pro manko da konoj kaj kompetenteco en komercaj aferoj ĝi ne scias kiel gvidi sian kapitalon (ideoj, produktoj, informacio, kontaktoj k.a.). Laŭ la esploro de socio pri mastrum–iniciato de la civitanoj nur 0,08 % el la laborkapabla loĝantaro en Bulgario posedas la necesan negocan kompetentecon agi en merkatorientigita ekonomiko kaj nur 1.18 % povos dum 1 – 1,5 jaro akiri tiujn konojn. Mankas referencoj pri merkatklerigiteco inter la gvidantoj de la privataj firmaoj. Tamen estas ĝojiga fakto, ke malgraŭ 45–jara totalitarismo la bulgaroj ne perdis sian entreprenemon. La privata sektoro kaj ties agadkampoj transformiĝas pli kaj pli en limigantan faktoron de la ŝtata interveno en la ekonomiko.

Evidente, la manko de klaraj leĝaj instrukcioj reflektiĝas en la interrilatoj de ĉiuj privatfirmaoj. La strebo estas travivi en la momento nepensante pri la fora estonto. Tiu fakto estas normala, ĉar por havi orientadon en la estonto vi devas resti viva hodiaŭ. La strategia orientado en iel longdaŭra plano estas ebla en socio, kie la privatagado havas siajn tradiciojn, kontinuecon, stabilecon. Ni ne forgesu, ke la makroekonomika medio en Bulgario ankoraŭ ne estas konstruita. Rilate al la merkato, ĝi ankoraŭ estas en proceso de formado – disrompiĝas la ŝtata monopolo, kaj oni faras provojn krei konkurencon. Ofte okazas manko de iuj elementoj: en la merkato (ekz. serĉante diabetikajn produktojn) ekzistas konsumantoj, sed mankas produktisto. Nek la ŝtata, nek la privata firmao interesiĝas, kiun eblecon

donas al ili tiu bezono.

Se iu firmao eksentus la konkretan bezonon antaŭ la aliaj, ĝi restados longan tempon en gvidanta pozicio en la merkato. Pro tio, ke la debito ankoraŭ superas la oferton estas malfacile apliki science motivitajn metodojn por la esploro de la konsumserĉado. La deficita ekonomiko, heredita de komunismo, direktas la orientadon pli al la kvantaj ol al la kvalitaj kriterioj. Mi timas, ke tiu deviga orientado degeneros en malpretendecon al la kvalito de la proponitaj produktoj. Malagrablan impreson por okuloj kaŭzas la improvizitaj vendotabloj, kie oni vendas malkvalitajn varojn, importitajn el Turkio, Grekio aŭ arabaj landoj. Ni ne parolas pri la tendenco en okcidenta Eŭropo, kie oni transformas la aĉetadon en travivaĵon. Temas pri la respondeco, kiun portas la novaj negocistoj, kiuj devas eduki en la loĝantaro bezonon iel altkvalitan.

Multaj novaj komercistoj en sia strebo al ekzistado ne konsideras la intereson de siaj partneroj. Ili ne profundiĝas en la esenco de la merkato, ne konscias ke la bona negoco estas partnereco. Ŝajnas al mi ke estas grave, importi en Bulgarion ne nur fremdajn kapitalojn sed ankaŭ komercan kulturon kaj etikon. Sekve estas necese altiri ne nur fremdlandajn kapitalojn, sed ankaŭ firmaojn kun tradicia komerca etiko.



Makroekonomika medio de la privata sektoro

La makroekonomika medio, en kiu la privataj negocistoj devos ekzisti, estas kreita de la ŝtato, de ĝia leĝodona kaj plenumpova estraro. Kaj la ŝtato nun estas la plej granda posedanto. Ĝia sektoro en 1989 produktis 91,6 % de la komuna produktado kaj 86,6 % de la nacia enspezo. Ĉu la ŝtato estas preta kontraŭstari sian propran ekonomikan monopolon? Laŭ la deklaracio pri la konstatoj, agado kaj intencoj de la registaro la struktura reformo ĝuas prioritaton. La registaro intencas stimuli la privatan mastrumon malaltigante la imposton sur la neta gajno de asocioj kaj "Joint Ventures" kaj sur la privataj mastrumantoj – malgrandigi la amplekson de la impostdevigita gajno. Tamen, tio estas ankoraŭ nur bonaj intencoj; ĝis nun la meza impostdevigo estas 52 % kaj mankas stimuloj por la juna privata sektoro. En la ekonomika teorio estas konata t.n. kurbo de Laffer. Arthur Laffer proponis modelon laŭ kiu ĉe la troa grandigo de la impostoj la rezulto estas mala – ne grandiĝos multe la enspezoj en la ŝtata buĝeto. Ŝajnas al mi, ke tiu modelo submetas al elprovo la impostan moralon de multaj propruloj, kiuj kaŝas siajn enspezojn pro la altaj mezuroj de la impostoj. La privataj negocistoj ŝatas neniel la distribuantajn funkciojn de la ŝtata buĝeto. Ili scias, ke la neefektivaj, eĉ bankrotintaj ŝtataj firmaoj ne povos pagi siajn impostojn. Pro tio estas malsaĝe, eĉ maljuste, ke oni

kalkulu al ilia bonfarto. Ili ekzistas en mia lando nur ekde 3 jaroj.

La Bulgara Nacia Banko (BNB) ankaŭ kontribuas al la malfacilaĵoj en la disvolviĝo de la privataj firmaoj malgraŭ ke dum 1987 ĝi malŝarĝiĝis de siaj funkcioj kiel komerca banko.

Ekde 1987 Bulgario havas dugradan banksistemon. La komplikaĵoj devenas de ĝia alta diskonta procento (54 %), kiu delonge stagnas, ege altprezigas sufiĉege la kreditojn donitajn de la komercaj bankoj kaj rapide malaltigas la ekonomian iniciaton de la privataj propruloj. Oni opinias, ke la alta nivelo de la baza interezo estas kaŭzo de la granda malkresko de la produktado; dum 1989 ĝi estis 19,5 % kaj dum 1990 atingis 27,8 %. La prognozo por 1992 laŭ iuj specialistoj estas, ke la malkresko malgrandiĝos kaj atingos 5–7 %. Ekzistas opinioj, ke tiu katastrofa malkresko estas intence provokita celante ke la malproduktivaj entreprenoj estu aĉetotaj je malaltegaj prezoj kaj ke ĉi tio eĉ koincidas kun la rekomendoj de la Internacia Valuta Fondo kaj Mondbanko. Se tio okazos vere, sendepende kies estas la rekomendoj, ni devas rimarki, ke humila plenumado de similaj scenarioj ne estas akceptita senproteste de la ordinara civitano.

Alia faktoro kontribuinta al malkresko de la produktado estas la disfalo de la rilatoj kaj strukturoj de Comecon – Konsilio de Ekonomika Interhelpo (KEI). La malfacilaĵoj en la komerco kun eksa Sovetunio kaj aliaj orienteŭropaj



landoj – membroj de KEI – kondukis al ĝis trifoja malaltigo de la importo kaj eksporto de Bulgario. Dum 1989 Bulgario eksportis al la membroj de KEI produktojn je valoro de 11 484,1 milionoj da levoj (84 % de la tuta eksporto) kaj importis je valoro de 9 424,5 milionoj da levoj (74 % de la tuta importo). Dum 1990 la eksporto de Bulgario estas 10 559,5 milionoj da levoj kaj la importo 10 314,9 milionojn da levoj. De tiu sumo estas eksportita al la membrolandoj de KEI 80 % de la tuta eksporto kaj 75 % de la tuta importo. Dum la sama jaro 1990 la eksporto por la landoj de EC estas 6 % de la tuta eksporto kaj por la landoj de EFTA (European Free Trade Association) ĝi estas 2 %. La grava recesio en la tuta orienteŭropa regiono kaŭzis ampleksan restriktivan premon sur la eksportmerkaĵoj de Bulgario al orienta Eŭropo, dum la eksterkomercaj prezoj alproksimiĝis al tiuj de la monda merkato. Jen kio klarigas la trifojan malgrandiĝon de nia varinterŝanĝo kun la eksaj membroj de KEI. Similan proceson travivis la aliaj ekssocialismaj landoj. Bedaŭrinde, Bulgario ne sukcesis kompensi la defalon de la orienteŭropaj merkatoj pere de disvastigado sian eliron sur la okcidenteŭropaj merkatoj, ĉar la eksporta strukturo de la lando, unuflanke konstruita por priservi la merkaton en la kadroj de Konsilio de Ekonomika Interhelpo, reale diferenciĝas de la monda merkato. Plia kaŭzo estas la malliberigita ŝtata monopolo en la ekstera merkato kaj manko de merkata pensmaniero de la privataj produktistoj kaj negocistoj. En la estonto oni

esperas al la rekonstruado de la proprietrajto en la agrikulturo, kiun oni konsideras la plej konkurenckapabla branĉo en Bulgario.

Oni "komisias" esperojn al la privata negoco rilate al alia makroekonomika elemento: la nombro de la senlaboruloj. Dum februaro 1992 oficiale registrataj senlaboruloj estis 430 000 (11.5 % de la laborkapabla loĝantoro). Samtempe la liberaj laborlokoj estis nur 11 000. La montritaj faktoj estas indikilo pri forta streĉo en la labormerkato, en kiu preskaŭ mankas movo, ĉar por tiuj oficiale registritaj senlaboruloj mankas "aĉetantoj" t.e dungantoj.

La karakterizita struktura reformo en la ekonomiko alportas malaperon, sed ankaŭ kreadon de novaj profesioj. Ĉar la struktura reformo estas ligita kun la kreskanta signifo de la privata sektoro, logike estas opinii, ke potencialo por kreado de nova okupateco ekzistas, nome en la privata negoco. De la streĉita labormerkato aŭ de la kontrolmanko profitas la malbonintencaj negocisto, kiuj dungas senkontrakte senlaborulojn pagante laborsalajrojn sub la minimumo. Dubinde estas, ĉe iu plendus pri simila spekulacio se morgaŭ tiuj enspezoj mankos. Provo veki aktivecon en la senlaboruloj estas la ideo de la registaro direkti ilin al memstara privatmastrumado pagante al ili tuj tutan sumon da helpmono. Sed mi dubas, ke simila starto sufiĉas por ke la senlaboruloj estiĝu "kapitalistoj". La senlaboreco sendube disciplinas nun la okupitajn



laborantojn. Ili ne povas kalkuli pri kresko de la reala valoro de la laborsalajro, kiu dum 1991 estas 56,4 % de la analoga dum 1990. Lau la rekomendo de la Mondbanko ĝi devas esti fiksita je tiu nivelo; laŭ tiu rekomendo nia registaro akceptis skalon pri reguligo de la kresko per la rimedoj de la laborsalajro. Absurde sed verŝajne tiu skalo gravos ankaŭ por la privata sektoro. Okaze de malpermesita kresko je la rimedoj de laborsalajro la privatposedanto pagos monpunon je profito al la ŝtato, malgraŭ ke tiuj rimedoj verŝajne estas perlaboritaj en lia firmao dank al la kvalito kaj efektiveco en lia propra agado. La stagno de kresko de la laborsalajro verŝajne celas kvietigi eventualan novan inflacion. Dum aprilo la ritmo de inflacio estas 5.8 %. Se tiu nivelo konfirmiĝos dum ĉiuj monatoj de la jaro oni atendos mezan jaran inflacion de ĉirkaŭ 70 %. Kvankam la planita ritmo de inflacikresko en la ŝtata buĝeto estas 60 %, multaj ekspertoj kvalifikas ĝin kiel "registaran optimismon". Dum la dua duono de monato aprilo la registara decido pri plialtigo de la prezoj de iuj vivogravaj varoj ekfuriozigis la spiritojn kaj provokis grandajn disputojn inter la sindikatoj kaj la registaro. Ekde la 1a de majo 1992 plialtiĝis je 35 % la tarifo de la elektroenergio, plialtiĝis la poŝtaj tarifoj (por leteroj, pakaĵoj, telefonoj) je 300 % kaj ankaŭ la aĉetprezoj de iuj agrikulturaj produktoj (viandoj, tritiko k.a.). La sindikatoj kalkulis, ke tiu altigo de la vivo kostos al la averaĝa bulgaro kroman elspezon je 360 levoj monate, kaj la registaro antaŭvidas kompenson ne

pli ol 1/3 de praktika stagnokresko de la laborsalajro kaj de la limigo de la socialminimumo de la nivelo adekvata al la mezo de la pasinta jaro. La kompensa mekanismo certe ne havos gravan efikon. La bezono de la kompensaj pagoj devigos multajn estrojn de firmaoj malmultigi la personaron kaj tio elvokas novan ondon de senlaboruloj. Plej akre tio tuŝas la pensiulojn. Ili ne povas esperi al flankaj enspezoj al sia dumviva pensio. La fina rezulto de la registara decido rilate al prialtigo de prezoj de vivogravaj varoj estos la neeviteble daŭriganta distavoliĝo de bulgara popolo.

Malgraŭ, ke iuj registaraj provoj ne plaĉis al la plimulto, ili estis logika rezulto de la nuna stato de ĉiuj branĉoj. La buĝeto estas tre streĉita kaj povas ne plu kovri la malgajnojn en la agrikulturado kaj energetiko. La longa reteno de la aĉetprezoj de la agrikulturaj produktoj puŝis tiun branĉon ĝis la sojlo de fizika sinsavo. Ankau la energetiko ne povas ekzisti, se ĝi ne ricevas de la buĝeto almenaŭ 1/3 de la urĝe necesaj monrimedoj. Tiujn monrimedojn ĝi ricevos de ni, de la elektrokonsumantoj. La plialtigo de energiaj elspezoj reflektiĝos malfavore al la tuta ĉenero ĝis la fina produkto.

Kiam Bulgario estos akceptita en la frunta triopo?

Kompare kun la landoj kiuj komencis pli frue sian reformadon, Bulgario malfrue reformis sian ekonomikon. De



tiu fakto oni povas ankaŭ gajni. Por tio ni devas atente ĉirkaŭrigardi kaj submeti al kritika analizo la spertojn de landoj, kiuj atingis iam iun sukceson en siaj reformatoraj fortostrecoj. Ĉar en la landoj de la frunta triopo oni jam rimarkas simptomojn de laciĝo de la reformoj. Estus saĝe se la bulgaraj ekspertoj kaj sciencistoj–ekonomistoj esplorus profunde la kaŭzojn de tiu laciĝo kaj trovus metodon pri la ĝustatempa evito de similaj fenomenoj; ĉar, kiel mi diris, la reformoj ne havas alternativon.

Lastatempe estiĝis tre populara la fabelo pri la leporo kaj la testudo: dum iu konkurado la leporo kaj la testudo devis trairi definitan distancon; la leporo provis per kelkaj saltoj trapasi ĝin, sed ĝi laciĝis kaj haltis sur la mezo de la vojo por ripozi; granda estis la surprizo de ĉiuj, kiam ili vidis, ke la testudo trapasis la finlinion, ĉar ĝi trairis la distancon malrapide sed sisteme.
Eble ne gravas, ke la aliaj landoj ne atendos nin; tio ankau ne estas ebla. Ni nur bezonas atingi nian celon.

RESUMO:

La artikolo rilatas al la transpaso de Bulgario de plancentraliza al merkatorientita mastrumado. Oni faras provon klarigi la problemojn rilate al tiu malfacila transpaso, kaj unue oni atentigas al la kaŭzoj kaj al la historiaj cirkonstancoj, kiuj kaŭzis la malfruiĝon de la

starto de la reformoj en Bulgario. La problemoj de la transpaso oni pririgardas en kelkaj reciproke ligitaj aspekoj:

– problemoj, kaŭzitaj de la malperfekta ekonomika leĝfarado,

– problemoj ligitaj kun la postrestado de ekonomika scienco de la mastrumadpraktiko,

– problemoj, kun kiuj estas konfrontitaj la privataj negocistoj.

La malfacilaĵoj en sia plej granda parto devenas el la nesufiĉa preparo kaj scipovo de la privatuloj en la sfero de la negocado, el la difektita psiko heredita de la deficita ekonomiko kaj ĉefe el la makroekonomikaj ĉirkonstancoj de la disvolviĝo.

Adreso de la autorino:
Svetlana Panajotova
k–x "Tschaika", bl. 47, vk. A, ap. 4
BG 9005 Varna
BULGARIO



## Intervjuo pri Hospitalo de Referenco en Latinameriko

En la koro de Havano, situanta en la tre loĝata municipo Centro Habana staras la Klinika Kirurgia Hospitalo "Hermanos Ameijeiras".
Kun siaj 24 etaĝoj de eleganta kaj moderna arkitekturo, kiu stariĝas fronte al la havana moleo, tiu institucio inaugurita en la jaro 1982 estis elektita dum 1991 kiel Fokusa Kunordigpunkto por la Hospitaloj de Referenco en Latinameriko.
Pro la graveco, kiun tiu fakto havas por la medicina scienco de la kontinento kaj speciale por Kubo, ni decidis intervjui la direktoron de la institucio d–ron Raul Gomez Cabrera, kiu afable akceptis respondi kelkajn demandojn por la legantaro de Scienca Revuo.

SR: Kiun signifon havas por vi la nomumo de la Klinika Kirurgia Hospitalo "Hermanos Ameijeiras" kiel fokusa kunordigpunkto por la Hospitaloj de Referenco en Latinameriko?

RGC: Ĉi tiu nomumo posedas duoblan signifon kies ĉefaj facetoi estas la scienca kaj la politika. De scienca vidpunto ĝi estas rekono al la evoluo de la kuba medicino pro ĉio kion ĝi reprezentas por la nacia popola sano. Politike estas paŝo al la konkretigo de la latinamerika integriĝo, kiu lau nia juĝo estas realigebla ne nur en la ekonomia kampo, sed ankau en la medicino, kampo en kiu ni volas kaj povas ĝin efektivigi.
Ĉi tiu moderna hospitalo, kies nuna prestiĝo estis konkerata kun dediĉo kaj peno, estas elokventa elmontro de la atingoj de la kuba medicino. Ĝia scienca laborado por la bono de la popola sano altiris al ĝi tre meritoplenan prestiĝon.

SR: Kiel vi taksas la laboron realigitan de via institucio dum la lastaj kvin jaroj?

RGC: La Hospitalo havas kiel ĉefan celon enkonduki novajn teknikojn kai teknologiojn. Dum la unua kvinjara periodo oni dediĉis sin al la enkonduko de